

**PASKO – 27-a de marto 2016**

## **KIAL VI SERĈAS LA VIVANTON INTER LA MORTINTOJ?**

**Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

*El la evangelio laŭ Luko 24, 1-12*

**Kaj la unuan tagon de la semajno, ĉe frua tagiĝo, ili venis al la tombo, alportante la aromaĵojn, kiujn ili preparis. Kaj ili trovis la ŝtonon derulita for de la tombo. Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de la Sinjoro Jesuo. Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen apud ili staris du viroj en brilaj vestoj; kaj dum la virinoj timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin: "Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis; memoru, kiamaniere Li parolis al vi, kiam Li estis ankoraŭ en Galileo, dirante, ke la Filo de homo devas esti transdonita en la manojn de pekuloj kaj esti krucumita, kaj la trian tagon releviĝi".**

**Kaj ili rememoris Liajn vortojn. kaj reveninte de la tombo, ili rakontis ĉion tion al la dek unu kaj al ĉiuj ceteraj. Kaj ili estis Maria Magdalena, kaj Joana, kaj Maria, la patrino de Jakobo; kaj la ceteraj virinoj kun ili rakontis tion al la apostoloj. Kaj tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj.**

**Sed Petro leviĝis kaj kuris al la tombo, kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris, mirante en si pri tio, kio okazis.**

En ĉi tiu ĉapitro Luko priskribas la resurekton de Jesuo, kaj kiel tio influis la kredon de la disĉiploj, kaj kiel malfacile ili tion komprenis. La lasta frazo en la antaŭa ĉapitro estis "*Kaj sabate ili ripozis laŭ la ordono*". La virinoj estis irintaj al la tombo por vidi, kie Jesuo estis sepultita, sed ili ne Lin ŝmiris per aromaĵoj nek balzamis, ĉar estis jam sabate. Kaj sabate oni ne rajtas fari iun ajn laboron.

Luko raportas, ke la komunumo malfacile forlasas la antikvajn regulojn, kaj ankoraŭ respektas la regulon de la sabato, ne alprenante la novon alportitan de Jesuo. La obeo al la leĝo baras la vojon al la sperto pri Jesuo resurektinta. Kaj Luko tiel komencas la novan ĉapitron: *"la unuan tagon de la semajno,..."*. Kiel en la kreado de la mondo. Ĉi tiu estas kreo nova, post kiu la vivo de la homo kapablos venki la morton.

*"...ĉe frua tagiĝo, ili venis al la tombo, alportante la aromaĵojn, kiujn ili preparis."* Ili ne faris tion en sabato por ne malobei la ordonon. *"Kaj ili trovis la ŝtonon derulita for de la tombo."* Luko ne precizigas, kiel. *"Kaj enirinte, ili ne trovis la korpon de la Sinjoro Jesuo."* Kompreneble ili ne trovas la korpon de la Sinjoro: ili ĝin serĉas en la sola loko, kie ĝi ne povas esti. Jesuo estas la vivanto, la viviganto: Li ne povas esti en la regno de la morto, en la ejo de la mortintoj

*"Kaj dum ili embarasiĝis pri tio, jen apud ili staris du viroj ..."*. Tiujn du viroj ni jam vidis, kiam la aspekto de Lia vizaĝo aliiĝis (Lk 9, 29-30): ili estis Moseo kaj Elija. Laŭ la stilo de Luko la nomo de nova rolanto estas citita nur la unuan fojon. Do ili estas Moseo kaj Elija.

*"...en brilaj vestoj."* Kiel dum la aliiĝo. *"kaj dum la virinoj timis kaj kliniĝis vizaĝaltere, tiuj demandis ilin:"*... Kaj tio, kion Luko dirigas al tiuj du personoj estas gravega vero kreda, rilatanta ne nur la konscion pri Kristo resurektinta, sed la vivon de ĉiuj kredantoj kaj ilian rilaton kun la morto. *'Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj?'* La tombo estas la nura loko, kie Jesuo ne estas trovebla. Se oni kredas, ke la morto ne nur ne estas interrompo, sed estas la vojo, tra kiu la homo akiras kondiĉon novan, plenan kaj ĉiaman, la tombo estas la nura loko ne traserĉenda.

Kiam mortas persono amita, ni devas elekti, eĉ se tio estas doloriga: aŭ ni funebras pro mortinto, aŭ ni konscias pri vivanto. Se ni funebras pro mortinto, ni vizitas la tombon, sed tie la amito ne estas; do ni devas konscii, ke temas pri vivanto. Kaj la du personoj admonas: *"Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj?"*. Oni ne serĉu inter la mortintoj iun, kiu vivas plu.

*"Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis; memoru, kiamaniere li parolis al vi, kiam li estis ankoraŭ en Galileo...",* "kaj ili rememorigas al la virinoj tiun antaŭdiron *"..."dirante, ke la Filo de homo...* (do ne la mesio, sed la homo atinginta la staton, kiu ne apartenas nur al Jesuo sed atingebla de ĉiuj Lin sekvantaj *"...devas...* (la verbo emfazas, ke tiu estas la volo de Dio, la plano de Dio) *"...esti transdonita en la manojn de pekuloj* (kaj tiu estas denunco de la reganta pastraro). Tiu antaŭdiro tekstis *"La filo de la homo devas multe suferi, kaj esti rifuzita de la pliaĝuloj kaj ĉefpastroj kaj skribistoj,* (tiuj estis la membroj de la ĉeftribunalo en Izraelo) *kaj esti mortigita, kaj la trian tagon releviĝi"* (Lk 9,22).

Do tiuj ĉefjuĝistoj menciitaj en Galileo estas, laŭ la vortoj de tiuj du personoj, la pekuloj. La uloj, kiuj sin taksis la personoj plej proksimaj al Dio, la plej malproksimaj de la medio de la peko, estas la pekuloj, ĉar ili mortigis la vivon, agis kontraŭ la vivo.

*Kaj ili rememoris ... (tiu vorto inkluzivas ankaŭ la ideon de kompreno) "Liajn vortojn;. 'kaj reveninte de la tombo, ili rakontis ĉion tion al la dek unu (ili ne plu estas dek du) kaj al ĉiuj ceteraj. Kaj ili estis Maria Magdalena (la virino, de kiu eliris sep demonoj, kaj Joana (la edzino de la ĉefimpostisto de Herodo), kaj Maria, la patrino de Jakobo; kaj la ceteraj virinoj kun ili rakontis tion al la apostoloj.*

*Kaj tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado, kaj ili ne kredis al la virinoj".* Jen ilia reago. Kial ili ne fidis? Ĉar virinoj ne estis fidindaj atestantoj: laŭ la juda tradicio, Dio neniam parolis kun virinoj. Fakte, tio okazis unu fojon, kaj la virino estis Sara, la edzino de Abraham, kiu al demando pri malgravaĵo respondis per mensogeto (Gen 18,15), kaj de tiu momento Dio ne plu alparolis iun ajn virinon.

Do, pro la mensogo de Sara la virinoj ne estis taksataj fidindaj atestantoj. Tamen la anonco pri la resurekto estis farita al nefidindulinoj. "Sed Petro leviĝis kaj kuris al la tombo, ..." do Petro ne volis kompreni la anoncon "... kaj kliniĝinte, vidis la tolaĵojn solajn, kaj li foriris, mirante en si pri tio, kio okazis.". Kredi la resurekton oni ne povas nur rigardante tolaĵojn, sed renkontante vivanton. Tio okazos en la posta epizodo, ĉe Emauso, kiam Jesuo dispecigos la panon (Lk 24, 30). Kiam oni dispecigas sian vivon por la aliaj, oni povas ekkonscii pri la resurekto.